Nova specimeno de la Internaciaj Ekzamenoj

**Parola parto**
**Elementa nivelo**

Poentoj: 50

Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 15-20 minutoj
La kandidatoj estas ekzamenataj unuope dum ĉ. 15-20 minutoj.

## 1. Bild(stri)o

*La kandidato ricevas bild(stri)on kaj devas klarigi la situacion prezentatan tie. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj. (Por blinduloj troviĝas objektoj prezentantaj unu ideon aŭ okazaĵon, ekz. butikon, oficejon, feston. Eblas ankaŭ fari rakonton laŭ kasedaj sonoj.)*

Rigardu la bildon kaj klarigu dum ĉ. 5 minutoj, kio okazas. Estu preta respondi demandojn de la ekzamenanto.

(15 poentoj)

## 2. Esperanto-kulturo

*Laŭ hazardo oni elektas por ĉiu kandidato po du demandojn el listo simila al la suba. La kandidato devas respondi ilin dum maksimume kvin minutoj. Por taksi la respondojn la ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.*

1. Kiel oni efektive uzas Esperanton en la nuntempo? Donu specifajn ekzemplojn.
2. Nomu la 3 partojn de la “Fundamento de Esperanto” kaj klarigu ties daŭran rolon en la evoluo kaj evoluigo de la lingvo.
3. Priparolu kelkajn aspektojn de la nuntempa junulara Esperanto-kulturo, ekz. organizaĵojn, renkontiĝojn, gazetojn, muzikon, k.s.
4. Elektu libron (romanon, novelaron, poemaron) originale verkitan en Esperanto kaj kiun vi estas traleginta. Priparolu la aŭtoron, la enhavon, kaj viajn impresojn de la verko.
5. Klarigu la t.n. internan ideon de esperantismo, uzante ilustre unu aŭ pli el la poemoj de L. L. Zamenhof.
6. Kio estas “fakasocio”? Kion fakasocio kutime faras? Kio estas la rolo de fakasocioj en la Esperanto-kulturo?
7. Elektu virinon kiu iam internacie elstarigis sin en la Esperanta kulturo. Parolu pri ŝia deveno, ŝia vivo, kaj ŝiaj kontribuaĵoj.
8. En malsamaj epokoj Esperanto famigis la du svisojn Edmond Privat kaj Claude Piron. Elektu unu el ili kaj priparolu liajn kontribuaĵojn al la Esperanta literaturo kaj kulturo

(20 poentoj)

## 3. Interparolo

*Por testi la kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas respondi demandojn kaj interparoli kun la ekzamenantoj pri du el la sekvaj temoj, hazarde elektitaj, dum tri aŭ kvar minutoj.*

1. Vojaĝado aŭ feriado
2. Ŝatokupoj
3. Ĉiutaga laboro
4. Loĝloko kaj loĝejo
5. Muziko
6. Libroj kaj legado
7. Familio
8. Esperanto-renkontiĝoj

(15 poentoj)